# NIA PONTO

Grupo Esperantista
Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre
48005-BILBAO (Hispanio)
Redaktas: J.Miguel García Iturrioz (jesusmiguel.garcia@ehu.es)
TTT-ejo: esperantobilbao.tk
Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎ 619.694.683 (Iciar)
☎ 658.709.087 (Jesús)
esperantobi@gmail.com

**Jar-kotizoj**: Normala: 30 €. Speciala: 15 €. Familia: 45 €.
**BBK-konto: 2095-0141-41-2218001550**

**JANUARO/FEBRUARO 2014** **Nro. 98 (1/14)**



Eduardo Larrouy alparolas kaj entuziasmigas la ĉeestantojn dum la zamenhofa tago, kiun oni okazigis la sabaton 14-an de decembro en la sidejo de la E-Grupo de Bilbao.

## LOKE ...

## Z-FESTOTAGO.



*Parto de la ĉeestantoj al la Z-festo dum alparolas ilin Eduardo Larrouy*

Kiel anoncite, la sabaton 14-an de decembro, oni okazigis renkontiĝon en nia sidejo por festi la naskiĝtagon de la kreinto de Esperanto. Post kelkaj vortoj de nia Sekretario, kiu resumis la ĉefajn okazintaĵojn de la jaro 2013, alparolis la ĉeestantojn nia amiko Eduardo Larrouy. Plena de entuziasmo, li dankis la organizitan omaĝon okaze de lia 100-jariĝo kaj puŝis nin antaŭen por labori favore al Esperanto.

Post la vortoj alvenis kunmanĝado de la frandaĵoj alportitaj de la ĉeestantoj kaj viglaj interparoladoj ĉirkaŭ plenplena tablo, finante per bonaj deziroj por la nova jaro.




## KRISTNASKA LOTERIO.

Unu jaron plian ni ne sukcesis gajni monon pere de la kristnaska loterio.
Do, ĝis la venonta jaro, kiam ni ĉiuj denove havos la okazon aĉeti la E-biletojn de la Grupo de Bilbao.

## STRANGE…

Traducciones al **esperanto** | servicios en Bilbao - Loquo
loquo.com
Se hacen traducciones de castellano a **esperanto**: textos publicitarios, páginas web, catálogos, informes, manuales técnicos, programas de... editorial …

*(Kaptita en Interreto. 11/02/2014)*

## Mencio pri Esperanto en la ĵurnalo "Deia".

Danke al nia kara amiko kaj Prezidanto de HEF, Toño del Barrio, ni sciis pri mencio al Esperanto en la vaska ĵurnalo "Deia" (16/02/2014).

Temas pri artikolo rilate al longdaŭra geedziĝo de Sebastián Mendivil (99-jara) kaj Teodora Urquiaga (97-jara). Li batalis, dum la hispana fratmilito, ene de la anarkisma bataliono "Bakunin". Ŝi, apartenanta al la vaska naciisma partió PNV. Eblas legi ke li lernis Esperanton ĉar pensis ke ĝi povus fariĝi la universala lingvo.

## CUOTAS DEL AÑO 2014.

Ya se puede pagar la cuota de socio correspondiente al año 2014. Cuanto antes se haga el pago, mayor será el beneficio para nuestra asociación.

Te recordamos que las cuotas, vigentes desde hace varios años, son:

Cuota normal: 30,00 euros anuales.
Cuota reducida: 15,00 euros anuales.
Cuota familiar: 45,00 euros anuales.

¡¡Muchas gracias por tu colaboración!!

## E-aranĝoj .

**18 - 20. aprilo** 95-a Brita Esperanto-Kongreso - en Sheffield, Anglio.
**24 - 26. aprilo** 15-a Israela Kongreso - en Kfar Hanokdim, 10 km oriente de la urbo Arad, prosime de Masada.
**1 - 4. majo** 73-a Hispana Kongreso de Esperanto kaj 18-a Andaluzia Kongreso - en Ronda (Málaga).




**29. majo - 1. junio** Kongreso de Espéranto-France (UFE) - en Chambéry.
**6 - 9. junio** 91a Germana Esperanto-Kongreso - en Erfurt
**6 - 12. julio** 10-a kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio - en Rijeka, Kroatio
**12 - 20. julio** 7-a SES, Somera Esperanto-Studado – La 7-a renkontiĝo de lernantoj de 'lernu.net' (sed ne nur de ili) en Slovakio, planita en urbo Nitra.
**18 - 25. julio** IJK - Internacia Junulara Kongreso - en Fortalezo, Brazilio
**26. julio - 2. aŭgusto** 99-a UK, Universala Kongreso de Esperanto - en Bonaero, Buenos Aires, Argentinio
**9 - 16. aŭgusto** 87a SAT kongreso - en Dinano, Francio
**23 - 30. aŭgusto** 81-a Itala Kongreso de Esperanto - Suno kaj montoj - en Fai della Paganella, Trento
**25. julio - 1. Aŭgusto 2015** 100-a UK, Universala Kongreso - en Lille, Francio.

## 73-a Hispana E-Kongreso.

De la 1-a ĝis la 4-a de majo 2014, en Ronda (Málaga).

*Informoj: andaluciaesperanto.blogspot.com*
*Temo de la kongreso: Esperanto kaj flamenko.*




En tiu ĉi momento jam pli ol 90 homoj anoncis sian partoprenon en la renkonto.

La organizantoj ankaŭ decidis ke la aliĝo estos senpaga por infanoj kaj gejunuloj naskiĝintaj post la 31a de decembro 1989. La detaloj pri kotizoj, aliĝmanieroj kaj ankaŭ pri la praktikaj informoj rilate al vojaĝado kaj gastigado troviĝas en la retejo http://arundakongreso2014.wordpress.com/.

La ĉeftemo de la Kongreso estos: *Esperanto kaj Flamenko*. Temos pri granda ŝanco konatiĝi kun tiu ĉi unika kultura formo, kies kerno troviĝas en la regiono gastiganta la renkontiĝon.

Por pliaj informoj, ne hezitu skribi al kongreso@esperanto.es.

*(Bitbulteno de HEF. 14/02/2014)*

## BELA KOINCIDO.

La aliĝado al la Kongreso de Arundo sekvas vere impresigan itineron. Pli ol du monatojn antaŭ la komenco de la renkonto, jam 100 homoj aliĝis al la Renkonto.

http://arundakongreso2014.wordpress.com/aligintoj/

Estas bela koincido ke la 101-a aliĝanto estas homo kiu post nur kelkaj tagoj fariĝos ĝuste 101-jara, nia kara **Eduardo Larrouy**.

Gratulon al la organizantoj, en Arundo kaj la proksimaj urboj, pro la bonega atingo. Rekordo de la lastaj jaroj estas jam klare atingita, kaj tio ĉi estas nur la komenco.

*(José Antonio del Barrio, Prezidanto de HEF. 21/02/2014)*

## GRATULON AL LA "COMPARSA ESPERANTO"

*"Comparsa Esperanto"* estas la nomo de karnavala muzikbando de la sevilprovinca urbo Mairena del Alcor, kiu dum tiuj ĉi tagoj partoprenas festivalojn en diversaj okcidentandaluzaj urboj, inter kiuj la *Kolumba Karnavalo* de Onubo, kaj kiu akiris la trian premion de la Festivalo de La Rinconada. Ĝi utiligas vestojn kaj maskojn rilatajn al Esperanto, kaj ankaŭ kantas kaj prezentas frazojn en la internacia lingvo. Hispana Esperanto-Federacio gratulas la bandon pro la presentado kaj la diskonigo de Esperanto.

Oni povas legi pliajn informojn pri la afero en la reta gazeto *Libera Folio* .

*(Bitbulteno de HEF. 14/02/2014)*

Esperanto furoras en la karnavalaj festoj de multaj hispanaj urboj:
http://youtu.be/6dW3-X_qgt4

*(Miguel Gutiérrez Adúriz. 09/02/2014)*

# INAŬGURITA LA INTERNA SPACO DE NIA RETEJO.

La membroj de Hispana Esperanto-Federacio kiuj tion petos, povas jam aliri la internan spacon de la retejo de la asocio. Jam troviĝas tie la kvar lastaj numeroj de nia bulteno (*Boletín*), en bita formato. Ankaŭ la protokoloj de la estrarkunvenoj kaj aliaj internaj dokumentoj.

Por aliri, sendu vian peton al la adreso esperanto@esperanto.es kaj vi ricevos la pasvortojn kaj instrukciojn.

Se vi ankoraŭ ne membras en nia asocio, jen plia kialo por aliĝi!

*(Bitbulteno de HEF. 14/02/2014)*



**Heineken EspañaCuenta verificada @Heineken_ES**

¿Qué tal una pequeña adivinanza... para celebrar que ayer fue el Día Mundial del Esperanto? pic.twitter.com/rn56drh9la





## BILDO DE HEINEKEN.

Heineken Hispanio proponis en Twitter divenludon en Esperanto, kiel memoro al nia lingvo.
https://twitter.com/Heineken_ES/status/412543397551816705
(evidente per automata tradukilo, sed ni estu tro postulemaj :-))
(Toño del Barrio. 16/12/2013)

# NOVA ESTRARO DE MADRIDA E-LICEO.

La Ĝenerala Kunveno de Madrida Esperanto-Liceo, okazinta la 27-an de januaro, elektis novan estraron por sekvaj kvar jaroj. Ĝin konsistigas:



Prezidanto: Manuel Parra
Sekretario: Ricardo Biurrun
Kasisto: José Francisco Platas
Voĉdonanto pri instruado: Juan Antonio del Castillo
Voĉdonanto pri informado kaj redaktado de Nia Voĉo: José Antonio del Barrio.

Manuel Parra naskiĝis en Segovio en 1963. Li diplomiĝis kiel bazlerneja instruisto sed neniam praktikis tiun profesion, kaj ĉiam laboris kiel ŝtata oficisto en diversaj fakoj; ekde 1995 en la ŝtata instanco pri Trafiko, en Madrido.

Esperanton li eklernis en 1986, instruata de César de Mosteyrín kadre de monto-grimpada klubo en Segovio. En 1995, logata de iu madrida esperantistino, Manolo ekloĝis en Madrido kaj komencis kunlabori kun Marcos Cruz en la centra oficejo de Hispana E-Federacio. En HEF postenis kiel sekretario ekde tiu jaro ĝis 2005, sub la sinsekvaj prezidoj de Antonio Alonso kaj Miguel Ángel Sancho. En 2010 li iĝis sekretario de Madrida Esperanto-Liceo kaj en januaro 2014 ekprezidis ĝin.

*(“Nia Voĉo”, órgano de MEL. Feb. 2014)*

## Malnova E-skribo sur ŝtono en Valencio.

Trovita malnova Esperanto-enskribo sur ŝtono en Valencilando: http://esperantoval.org/eo/enskribo-sur-stono-trovita-en-tavernes-de-la-valldigna

*(Enric Baltasar. 12/01/2014)*

Mi ne scias, ĉu iamaniere tio rilatas kun la skribaĵo, tamen estas konate, ke komence de la 3-a jardeko loĝis en la valencia montaro germana esperantisto kiuj eskapis el la nazia teroro.

*(Jose Maria Rodriguez. 12/01/2014)*

## KURSO PRI FIZIKO EN BITOTEKO.

La 2-voluma esperantlingva Baza Kurso de Fiziko, de Walter Bernard, eldonita far Esperanto-Klubo de Sudtirolo en la jaro 2012, estas nun enretigita far Ana Manero en Bitoteko HEF.

Legebla kaj elŝutebla el : http://hdl.handle.net/11013/4304

*(Darío Rodríguez. 16/12/2014)*

## JAM PRETAS LA ALIĜILO AL HEF POR 2014.

Jam troviĝas en la reto la Aliĝilo al Hispana Esperanto-Federacio por la jaro 2014 http://www.esperanto.es/hef/images/PDF/Inscripcion2014eo.pdf.

Se vi ankoraŭ ne estas ano, vi povas aliĝi en iu ajn momento, sendante la aliĝilon al la adreso admin@esperanto.es.

Ĉijare la Ĝenerala Kunveno de HEF aprobis la kreadon de speciala kotizo por junuloj (malpli ol 30 jaroj), senlaboruloj kaj aliaj personoj kun ekonomiaj malfacilaĵoj. Bv. kontakti la menciitan adreson por koni la detalojn.

*(HEF. "La Bitbulteno")*

## Jam 5 bilbaoanoj aliĝis al la Kongreso en Ronda (Málaga).




Niaj amikoj de Málaga daŭre laboras cele al la organizado de la Hispana Kongreso.

Krom okazigo de E-kurso, ili ankaŭ organizis Z-tagon en tiu bela urbo de la suda Hispanio.

Alie, inter la pli ol 100 homoj jam aliĝintaj troviĝas **5 membroj de la E-Grupo de Bilbao**. Ankoraŭ estas tempo por aliĝi; ni invitas vin fari tion, eĉ se vi ne ĉeestos la kongreson; tiamaniere, vi helpos la ĉiam komplikan organizadon de evento tia.

**VIZITU LA RET-PAĜON DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO (HEF). ĜI DISPONIGAS, HISPANE KAJ ESPERANTE, MULTAJN INTERESAJN SERVOJN: BITOTEKO (bitigitaj biblioteko kaj gazetoteko), INFORMOJ DIVERSAJ, ADRESOJ DE HISPANAJ ASOCIOJ, HISPANA KONGRESO, Ktp., ktp.**

## TRA LA MONDO …

## EŬROPA E-UNIO.

La asocio Eŭropa Esperanto-Unio, kiu devus agi kiel lobio en Bruselo cele al la agnosko de nia lingvo fare de Eŭropa Unio, havas problemojn. Libera Folio priskribas tiujn problemojn, ĉefe ĉar la esperantaj asocioj brita kaj hispana ne pagas kotizon al EEU. En tiu informo aperas deklaroj de niaj forumanoj Zlatko Tišljar kaj Toño del Barrio: http://www.liberafolio.org/britaj-esperantistoj-forlasis-europan-union

*(Darío Rodríguez. 13/12/2014)*

## ESPERANTO TV.

Nova skipo formiĝis en Sidnejo (Aŭstralio) kun la celo starigi televidan kanalon elsendantan 24 horojn 7 tagojn semajne en Esperanto. La skipo de tiu kanalo, kiu nomiĝas "Esperanto TV", invitas vin ŝati sian Facebook-paĝon por ricevi ĉiujn plej novajn ĝisdatigojn pri la lanĉo. Vidu ĝin ĉe: http://www.facebook.com/LaEsperantoTV

Vi povas ankaŭ vidi la kampanjovideon de Esperanto TV ĉe: http://www.istreamstudios.tv/index.php/channel/19/languages/

Esperanto TV estas unu el la multaj kanaloj kiujn lanĉos iStreamStudios, promesplena provizanto de interreta televido kun sia sidejo en Aŭstralio.

*(Darío Rodríguez. 03/02/2014)*

## HELPO: Persona nomo "Esperanto".

Germana Esperanto-Asocio ricevis leteron de persono, kiu ĵus fariĝis patro de filo. Li volas doni al la infano ankaŭ la duan personan nomon "Esperanto".

Nun la koncerna urba instanco skribis al li, ke tio ne eblas, ĉar ne eblas pruvi, ke temas pri vira persona nomo. Ĉu iu hazarde konas viran personon kun la nomo "Esperanto"?.

*Amike, Martin*

En la jaro 1909 naskighis en San Fernando (Kadizo) Francisco de Asis Esperanto Garzón, filo de S-ro Jose Garzon Ruiz, pioniro de la E-movado en Andaluzio. Lau la Enciklopedio de Esperanto tiu homo estis la unua en la mondo kiu nomighis “Esperanto”, kvankam verdire ne temis pri la unua nomo. Francisco de Asis Esperanto fariĝis nek esperanto-parolanto nek movadano, krome lia vivo estis plena je malsanoj.

Oni devas elstari la fakton, ke ekzistas en Hispanio, mi supozas ke ankau sur aliaj lokoj, nomo tre simila al “Esperanto”, temas pri –Esperato- (kristana sanktulo memorata la 19-a de julio). Almenaŭ en Madrido, ekzistas unu homo kun tiu nomo (Esperato Fernandez Grande); anekdote mi diros, ke li estas/estis direktoro de la fama lernejo “San Ildefonso” en Madrido, tiu pri la nacia lotado, kaj antaŭ kelkaj jaroj oni intervjuis lin okaze de la Kristnasko, mi ankaŭ memoras ke la ĵurnalisto asertis dum la intervjuo: “Ha, S-ro Esperato vi havas nomon de universala idiomo”.

*(José María Rodríguez Hernández, Kordovo. 11/02/2014).*

## 15 Decembro - Zamenhofa Tago.

Permesu al mi iom da humoro:

5 JUDOJ KIUJ ŜANĜIS LA FORMON RIGARDI LA MONDON:
Venis Moseo kaj diris: la Leĝo estas ĈIO!
Venis Jesuo kaj diris: la Amo estas ĈIO!
Venis Markso kaj diris: la Kapitalo estas ĈIO!
Venis Freud kaj diris: la SEKSO estas ĈIO!
Tamen, poste venis Einstein kaj sendis ĉion tohuvabohuen dirante: ĈIO estas relativa!

Kompreneble, ni jam scias ke la Interna Ideo estas ĈIO!
danke al la sugesto de alia elstarulo...
Same(nhofe) kaj amike al vi, LN

*(Loreno Noguero. 15/12/2013)*

## Mazi en Gondolando, kompleta, nun kun subtitoloj.

La populara Esperanto-kurso "Mazi en Gondolando" jam estis spektebla kiel kompleta filmo ĉe Youtube, sed en la originalo nur aŭdigis la paroladoj, sen skribita teksto.

Sed nun Nikolaj Mihajlenko aldonis subtitolojn en Esperanto, kio estas granda helpo por komencantoj.

Jen la adreso de Mazi en Gondolando subtitolita (daŭro 1 horo kaj 35 minutoj)
http://www.youtube.com/watch?v=Sx4QBPRBO4w

*(Darío Rodríguez. 23/02/2014)*

## HITLERO KAJ ESPERANTO dubligita.

HITLERO KAJ ESPERANTO… nun dubligita!

http://youtu.be/NTClYMYHyh8

*(María Zocato. 24/02/2014)*

## Mesaĝo en Esperanto ĉe la retejo de Unesko.

Informo de Stefano Keller, kunordiganto de la estrara subteamo "Mondo":

Ĵus aperis la esperanta versio de la mesaĝo de s-ino Irina Bokova, Ĝenerala Direktoro de Unesko, diskonigita okaze de la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo, 21a de februaro 2014:

jen la adreso de la paĝo:
http://www.unesco.org/new/en/international-mother-language-day/
serĉu meze de la paĝo, sub 'la Francophonie':

*(Mark Fettes, 24/02/2014)*

TTT-ejo de la E-Grupo de Bilbao: esperantobilbao.tk